

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

IZNATORAF **(Jaeno)**



38-a Jarkolekto - Septembro 2024 - N-ro 134

Julio / Septembro 2024
Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.**
P. 07 Andaluzoj en Aŭŝvico.
P. 10 Lingva Angulo:
La voz pasiva.
P. 17 Poezia Angulo.
P. 18 Nuntempa Vortaro:
Ni konstruas domon.
P.22 Folioj por Praktikado.
P. 28 Turismi en ... Iznatoraf (Jaeno)
P. 31 Notoj pri Esperanto kaj
Andaluzio: Rodrigo Vaquera.
La sevila poligloto enamiĝinta
al esperanto.
P. 34 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Ĉu balenoj uzas propran
lingvon?
P. 36 Flamenko:
La Paquera de Jerez.
P. 38 Fervojista angulo:
La "Angla Linio" de Almerio.
P. 41 Komikso: Ĉu mi estas homo
aŭ maŝino?
P. 49 Nun Ni. Junulara Paĝo.
P. 50 Ŝako: Malfermoj.
P. 52 Andaluzia kuirarto:
Karotoj laŭ andaluzia stilo.
P. 54 Misteroj kaj Legendoj de
Andaluzio: "Las Camachas".
Sorĉistinoj en Montilla.
P. 56 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz,
en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación
Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de
Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante



Sur la kovrilo:
Vidaĵo de Iznatoraf (Jaeno)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Zamenhofa Tago en Andaluzio ~ 2024

En **Sevilo**, la pasintan 15-an de decembro, dekkvino da esperantistoj kaj familianoj festis la tradician Zamenhofan Feston, aŭ la Tagon de la Libro en Esperanto. Kiel tradicie, sevilaj esperantistoj renkontiĝis en restoracio *Campeones* por ĝui bonan manĝadon kaj agrablan etoson. Fine, la prezidanto de Sevila Esperanto-Asocio alportis frandan kukon kie aperis la portreto de Zamenhof. Temis pri bildo manĝebla kaj tuj manĝita.



Partoprenantoj en la Zamenhofa Tago en Sevilo la pasintan decembrom 2024.

Sube, kuko havigita de la prezidanto de Sevila Esperanto-Asocio kun manĝebla, kaj bongusta, portreto de L. Zamenhof.

En **Malago** la Zamenhofa Festo okazis en la kafejo "Esperanto", troviĝanta ĉe la strato "Esperanto". La malagaj esperantistoj tostis je la memoro de la aŭtoro de la lingvo kun delica ĉokolado kaj benjetoj (en la hispana lingvo "*churros*").



NIA SEVILA AMIKO VIKO INTERVJUATA EN LA RADIO-PROGRAMO *BLABLANDO*

La pasintan 25-an de aŭgusto nia sevila samideano Vicente Manzano, Viko, estis intervjuata en la programo de Hispana Nacia Radio-3 "Blablando". La temo de tiu programo estis "Esperanto: ¿sueño o realidad?" (Esperanto: ĉu revo aŭ realo?).

Dum duon-horo Viko parolis pri la origino kaj pri originaleco de la Zamenhofa elpenaĵo. Li ne forgesis ankaŭ mencii la rilatojn de la esperanta kaj andaluzia fonetiko. La programo finiĝis per la elsendado de la kantaĵo "Pluvas".

Eblas aŭskulti la programon ĉe:

<https://www.rtve.es/play/audios/blablando/blablando-esperanto-sueno-realidad-25-08-24/16225756/>



VIRTUALA PRELEGO PRI ESPERANTO EN LA OFICIALA LINGVO-LERNEJO DE ALCALÁ DE GUADAÍRA (Sevilo)

Kadre de kompletiga kultura programo organizita de la Oficiala Lingvo-Lernejo, la pasintan 16-an de aprilo okazis prelego pri la lingvo Esperanto. Nia samideano Vicente Manzano "Viko", profesoro en la Psikologia Fakultato de la Universitato de Sevilo, prelegis virtuale dum 40 minutoj pri la internacia lingvo al ĉiuj interesitoj. Ĉi tiun agadon organizis oficiala lingvo-lernejo, kie okazas kursoj pri la lingvoj franca kaj angla.



ESPERANTO, ELSTARA MOVADO EN LA SIREN-DOMO EN SEVILLO

Komence de la pasinta monato junio okazis en la Casa de las Sirenas de Sevilo, konata ankaŭ kiel Siren-domo inter la esperantistaro, aktoj por diskonigi la historion kaj agadon organizataj en tiu municipa kultur-centro. Tiel, la 7-an de junio okazis ronda-tabla konferenco pri la temo "Partopreno de societoj en Siren-Domo". Partoprenis en tiu ronda tablo, inter aliaj asocioj, Sevila Esperanto-Asocio, reprezentita de Antonio Rodríguez Gasch.



Estas necese memori, ke Siren-Domo estas municipa kultura centro en la centro de la urbo Sevilo, kie la sevila esperantistaro sidejas jam de antaŭ kelkaj jardekoj.

REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al nia socioj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al *cordoba@esperanto.ac*, por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.



VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a *cordoba@esperanto.ac*, informando del abono de la cuota.

Muchas gracias y contamos con tu colaboración.



Andaluzoj en Aŭŝvico

La pasintan 28-an de januaro la mondo memoris la 80-an datrevenon de la liberigo de la ekstermejo, aŭ koncentreja komplekso, de Auschwitz-Birkenau, esperantigita kiel Aŭŝvico. Tie estis murdigitaj, inter la jaroj 1940 kaj 1945, pli ol unu miliono da homoj. La plej granda parto de la viktimoj estis judoj, tamen ankaŭ estis kruele mortigitaj tie granda nombro da ciganoj, samseksemuloj kaj politikaj prizonuloj, ili estis la homoj, kiujn la nazioj volis komplete forigi de la Tero. Rilate naciecojn, la plejmulto el la viktimoj en Aŭŝvico estis hungaroj, poloj, germanoj, rusoj kaj francoj. Troviĝis ankaŭ hispanoj, ĉefe respublikaj aktivistoj, kaptitaj dum la germana okupacio de Francio, kaj hispanoj jud-devenaj. Inter ili ankaŭ kelkaj andaluzoj. Nun, iliaj nomoj estas konataj.



Enirejo al la ekstermejo Aŭŝvico en Pollando

- **Noel Friedheim**, jud-devena. Li naskiĝis en la sevila vilaĝo Gerena. Li laboris kiel juvel-komercisto kaj pro tio, li ofte vojaĝis en Francion. Kiam li estis 69-jaraĝa, germanoj arestis lin kaj li estis deportita en la francan koncentrejon Drancy. Tiu loko estis provizora loko ĝis la definitiva forkonduko de la prizonuloj en Aŭŝvicon. Li mortis en la jaro 1942.

• **Sara Avram**, jud-devena. Ŝi naskiĝis en Kordovo. Sara estis dommastrino. Oni ne konas la kialon, sed Sara estis en Francio kiam ŝi estis arestita de la nazioj, tamen, supozeble, ŝi akompanis junan familianon, eble filon aŭ nepon, pro la fakto, ke unualoke ŝi estis forsendita al la koncentrejo de Pithiviers. En ĉi tiun ekstermejon estis senditaj la plej junaj kaptitoj. Post Pithiviers ŝi estis deportita en Aŭŝvicon, tie Sara mortis.



Proksimume 1'5 milionoj da infanoj estis murditaj en la naziaj ekstermejoj

• **Dayla Albatros**, jud-devena. Ŝi naskiĝis en Sevilo, tie ŝi laboris kiel tajlisto de gemoj. Post sia edziniĝo kun David, franca judo, Dayla migris en Francion. En la jaro 1939 nazioj arestis ŝin en Strasburgo. Unuamomente, Dayla estis deportita en la ekstermejon Bergen Belsen, poste en Aŭŝvicon. Laŭ informoj, ŝi estis murdita en gasĉambro, ĉar ŝi estis tro maljuna por labori.

• **María Alonso**, sendube la plej konata andaluzia viktimo en Aŭŝvico. Ŝi naskiĝis en Santa Fe de Mondújar, vilaĝo en la provinco Almerio, en la jaro 1910. Post iri en Barcelonon, ŝi migris en Francion kun sia edzo kaj du filoj. En Parizo María laboris kiel flegistino. Ankaŭ en la franca ĉefurbo, ŝi kontaktis kun ekzilitaj hispanaj respublikanoj kaj poste kun la kontraŭnazia rezistado. En la hospitalo Tenon en Parizo, kie ŝi laboris, kaŝite helpis francajn rezistantojn sub la nomo *Josée*.

Malkovrita de la nazioj, ŝi estis arestita en januaro 1943 kaj tuj sendita en la ekstermejon de Aŭŝvico-Birkenau. Tie, ŝi estis tatuita kun la nombro 31778 kaj enkarcerigita en la pavilono de polaj malliberigitaj. En la ekstermejo ŝi estis vere kuraĝa, laŭ deklaroj de poste liberigitaj prizonuloj.

Iam ŝi estis batita de germana gvardisto, tamen ŝi respondis kun pliaj batoj kontraŭ la agresanto, malgraŭ la malsimilaj fortoj de ambaŭ.



María Alonso
Santa Fe de Mondújar (Almerio) 1910 ~ Aŭsvico 1943

María Alonso mortis en februaro 1943. Nuntempe, memoriga tabulo en la hospitalo Tenon (Francio), kie li helpis la francajn rezistantojn, omaĝas ŝin kun la frazo "María Alonso, flegistino, mortinta je Francio".

Multaj aliaj andaluzoj mortis en ekstermejoj dum la Dua Mondmilito. Oni kalkulas, ke entute pli ol 1500 estis enkarcerigitaj en tiuj koncentrejoj, el ili, nur triono postvivis, la plejmulto en la ekstermejo Mauthausen.

Ni ne forgesu ilin !



Memoriga tabulo omaĝe al María Alonso kaj aliaj viktimoj de nazismo en Francio.

Lingva Angulo

La voz pasiva



En la mayoría de las frases encontramos los siguientes elementos:

| | | | | |
|------------------|---|--------------|---|---------------|
| Sujeto | - | Verbo | - | Objeto |
| Mi amigo | | lee | | un libro |
| <i>Mia amiko</i> | | <i>legas</i> | | <i>libron</i> |

Sin embargo, también existe la posibilidad de convertir al objeto en sujeto de la frase, así, lo que antes era sujeto, ahora pasaría a llamarse "complemento agente". Esta construcción es lo que se denomina voz pasiva. Ejemplo:

| | | | | |
|--------------|---|---------------------|---|--------------------|
| Sujeto | - | Verbo en voz pasiva | - | Complemento Agente |
| Un libro | | es leído | | por mí |
| <i>Libro</i> | | <i>estas legata</i> | | <i>de mi</i> |

La voz pasiva también existe en esperanto, aunque hay que advertir que su uso es muy poco usual, al menos cuando se trata del idioma hablado. Siempre se puede encontrar una alternativa al uso de la voz pasiva, aunque por supuesto, como hablantes podemos usar esta construcción si lo deseamos, aunque sea poco habitual hacerlo.

Así, si decimos:

La libro estis vendita de mia patro (el libro fue vendido por mi padre).

Podemos sustituir la voz pasiva diciendo:

Mia patro vendis la libron (mi padre vendió el libro)

Veamos cómo se forma la voz pasiva en esperanto, partiendo de la oración *Mi vendas domon* (yo vendo una casa).

Para transformar esa oración en pasiva, en primer lugar el objeto *domon* pasará a ser sujeto. Por supuesto, al dejar de ser objeto, perderá la "-n" final del acusativo.

El verbo pasa a tener la siguiente estructura: "verbo *ESTI* (en presente, pasado o futuro) + participio del verbo principal.

Y por último el sujeto pasa a ser complemento agente con la estructura: "*de* + complemento agente".

Así, *Mi vendas domon* en voz activa, se convierte en pasiva en:

Domo estas vendata de mi.



Hay que tener en cuenta algunas cuestiones para formar la voz pasiva, veamos algunas de ellas:

* Cualquier complemento que existiera en la frase en voz pasiva (de lugar, de modo, de tiempo...), pasa a la voz pasiva sin cambios:

Mi legas libron en la biblioteko, sabate vespere.

Libro estas legata de mi en la biblioteko, sabate vespere.

* La voz pasiva solo puede formarse cuando intervienen verbos que en la voz activa pueden ir acompañados de objeto, es decir, de verbos transitivos. Con

un verbo intransitivo no podría formarse una oración en pasiva, simplemente porque no hay posibilidad de encontrar un objeto que pueda actuar de sujeto. Por ejemplo:

En voz activa: *Mi sidas sur seĝo.*

Me siento sobre una silla.

El verbo *sidi* es intransitivo. Con esa frase no se puede formar una oración en pasiva.

* Cuando el sujeto en la voz activa es ONI se puede suprimir como complemento agente, cuando pasamos la oración a pasiva. Ejemplo:

Voz activa: *Oni aprobos la novan leĝon pri ekonomio.*

Voz pasiva: *La nova leĝo pri ekonomio estas aprobita.*

(no aparece como complemento agente: "*de oni*")

Lo mismo ocurre, aunque no es estrictamente necesario, cuando se trata de un pronombre indefinido. Ejemplo:

Voz activa: *Iu helpos lin.* (Alguien le ayudará)

Voz pasiva: *Li estos helpata* (no es necesario decir "*de iu*").

Voz activa: Oni instruas ekonomion.

Voz pasiva: Ekonomio estas instruata. (~~de oni~~)

Voz activa: Iu pagis la abonon.

Voz pasiva: La abono estis pagita. (~~de iu~~)

Quizá la cuestión más importante, y también la que a veces causa algún que otro problema, es como usar el verbo auxiliar ESTI y el participio correspondiente. Antes que nada hay que advertir que la discusión "*ata-ita*" ha llenado páginas y páginas de debate entre los lingüistas en esperanto. Así, que sin ánimo de darle una solución a este problema, sino simplemente abordarlo, para aprender cómo usar los verbos compuestos en la voz pasiva, podemos decir que los verbos en una oración en voz pasiva tienen la siguiente estructura:

Verbo EST -as/-is/-os + participio del verbo principal: *ata/ita/ota*

Veamos qué situaciones podemos encontrar en lo relativo al momento en el que se realiza la acción:

- La acción se desarrolla en el momento presente: *ESTAS* + participio *ata/ita*.

Voz activa: *Mi akompanas mian amikon.*

Voz pasiva: *Mia amiko estas akompanata de mi.*

Mia amiko estas akompanita de mi.

Como hay autores que defienden que el participio debería ser "*ata*" y otros "*ita*", vamos a dar por válidas ambas opciones.

- La acción se desarrolló en el pasado: *ESTIS* + participio *ata/ita*.

Voz activa: *Mi akompanis mian amikon.*

Voz pasiva: *Mia amiko estis akompanata de mi.*

Mia amiko estis akompanita de mi.

- La acción se desarrollará en el futuro: *ESTOS* + participio *ata/ita*.

Voz activa: *Mi akompanos mian amikon.*

Voz pasiva: *Mia amiko estos akompanata de mi.*

Mia amiko estos akompanita de mi.

Sobre el tema del uso del participio terminado en *ATA* o en *ITA* los lingüistas tienen diferentes opiniones y sus discusiones podrían llenar bibliotecas enteras, así que en la lengua esperanto del día a día, digamos *akompanata* o *akompanita*, según prefiramos, las dos terminaciones encuentran justificación para ser consideradas como correctas.

Hemos visto que el participio termine en *-ata* o en *-ita*, termina en "-a", así que podemos decir que actúa en la frase como un adjetivo, podemos decir que es la forma adjetival del verbo. Sin embargo, hay una situación en la que terminará en "-e", porque actúa como un adverbio. Esto se produce cuando el

sujeto de la acción es una frase subordinada. Parece complicada esta definición, pero veremos que es algo muy simple. Vamos a pensar en el caso de que el objeto de una frase sea otra frase subordinada, ejemplo:

El director prohibió cantar en voz alta.

La direktoro malpermesis kanti laŭte.

Si pasamos esa frase, a la voz pasiva, el objeto de la voz activa pasará a ser el sujeto en la voz pasiva, así: "Cantar en voz alta está prohibido por el director".

Recordemos que los adjetivos (-a) califican a un sustantivo, ejemplo:

La blanka floro / La flor blanca.

Pero si de lo que se trata es de calificar un verbo, entonces usaremos el adverbio (-e). Ejemplo:

Kanti estas agrable / Cantar es agradable.

Así que si los verbos son calificados no con un adjetivo, sino con un adverbio, entonces el participio que se refiere a ese verbo no actuará como un adjetivo, sino como un adverbio. Ejemplo:

Cantar en voz alta está prohibido por el director.

Kanti laŭte estas malpermesite de la direktoro.

Es decir, el participio actuará como un adjetivo (terminado en -a), si el sujeto es un sustantivo, pero será un adverbio (terminado en -e) si el sujeto es un verbo. Para terminar de entender este asunto veamos algunos ejemplos de uno u otro caso:

- *La libro pri gramatiko estas legata de la lernanto.*
(libro-legata).
- *Ĉi tiu monumento estis konstruita de antikva civilizacio.*
(monumento-konstruita).
- *Ne fumi estas konsilite de prestiĝaj kuracistoj.*
(ne fumi - konsilite).
- *Marŝi antaŭen estis ordonite de la kapitano.*
(marŝi - ordonite).

Si el sujeto de la oración en voz pasiva es un verbo, entonces el participio no toma la forma de adjetivo, (-a), sino de adverbio (-e).

Studi ĉiutage estas konsilata de la profesoro
Estudiar diariamente es aconsejado por el profesor

Veamos por último algunos casos también especiales de la voz pasiva.

- Cuando en el objeto en la voz activa, que pasa como sujeto a la voz pasiva, aparece el posesivo "sia", este cambiará al género y número que corresponda. Veamos algunos ejemplos:

- Voz activa: *La filoj amas sian patrinon.*
- Voz pasiva: *Ilia patrino estas amata de la filoj.*
- Voz activa: *Li prezentis sian fianĉinon al ni.*
- Voz pasiva: *Lia fianĉo estis prezentita al ni de li.*

Esto es lógico. Pensemos que el posesivo "sia" se refiere siempre al sujeto, pero nunca aparece en ese sujeto, así, no se puede decir:

Sia amiko estas inteligenta..... sino:
Lia / Ŝia / Ilia amiko estas inteligenta.

Por eso, al pasar ese objeto en el que aparece "sia" a ser sujeto, tiene que tomar la forma que corresponda: *lia / ŝia / ilia.*

- Puede ocurrir también que nos encontremos con un verbo que, aun siendo transitivo, es decir que lleva objeto directo, en esa frase no lo lleva. Veamos:

- *Oni rakontis tiel sur la antikvaj libroj.*

Se contó así en los libros antiguos.

El verbo "rakonti" es transitivo, se traduce por "contar, narrar", pero en esa frase del ejemplo no va acompañado de ningún objeto directo. Entonces, si lo pasamos a voz pasiva ¿cuál sería el sujeto?

En este caso la frase en pasivo no tendría sujeto, y el participio también aparecería en forma de adverbio (-e). Sería del siguiente modo:

Voz activa: *Oni rakontis tiel sur la antikvaj libroj.*

Se narró así en los libros antiguos.

Voz pasiva: *Estis rakontite tiel sur la antikvaj libroj.*

Fue narrado así en los libros antiguos.



Sí, es cierto, la cuestión de la voz pasiva puede dar a veces un poco de dolor de cabeza, pero es interesante conocer esta forma gramatical. De todos modos volvemos a repetir, que en el esperanto hablado de cada día no se utiliza mucho y, casi siempre, puede sustituirse por una frase en voz activa que es mucho más simple y que indica lo mismo.

A screenshot of the website www.esperanto.ac. The header features the logo of the "Asociación Andaluza de Esperanto" (AAUE) and the text "Andaluzia Esperanto-Unuiĝo" and "Asociación Andaluza de Esperanto". Below the header is a navigation menu with links: "Inicio", "¿Qué es el esperanto?", "Cómo aprender esperanto", "Aprende con juegos", "Andaluzio", "Gazeto Andaluzia", "Grupos locales en Andalucía", "Pri Flamenko", and "VENTO". The main content area has a green background with the text "En el mundo se hablan más de 6000 lenguas." and a colorful graphic showing the word "Thank you" in various languages: English, Esperanto (Dankon), Italian (Grazie), Spanish (Gracias), Chinese (谢谢), Japanese (ありがとう), Korean (감사합니다), and others.



Tempesto

Malfermiĝis ĉiu floro
sub fekunda densa pluvo,
kaj en la obskura nokto
ili estis kvazaŭ buŝoj
ricevantaj la kajolojn
kaj el mamoj vivonutron.

Marŝas laŭ militparado
surĉiele nubarmeo
plenŝarĝita de akvaro
defilanta kun majesto;
ŝajnas ora bril' de sabroj
kaj malŝarĝo de kolero
l' internuba fajrfulmado
de l' sovaĝa fulm-tempesto.

Ahmad Abu Amir ibn Suhayd
Esperantigis Antonio Marco Botella

Ahmad Abu Amir ibn Suhayd. (Kordovo 992-1035).
Al-andalusa poeto, de la umaja dinastio. Li estas aŭtoro
de *Risalat al-tawabi wa-l-zawabi* (*Epistolo de la geniuloj*),
verkita proksimume en la jaro 1015-a.



Ni konstruas domon



Masonisto




Konstrueja kasko



Ĉarumo



Briko



Muro el brikoj




Pioĉo



Ŝovelilo




Trulo




Tubaro



Okul-ŝirmiloj



Gruo



Trabo



Beton-kamiono



Pneŭmata
martelo

Betono



Armita betono / Fer-betono

Beton-feraĵo



Beton-miksilo



Cemento



Kalkaĵo sur muro



Glatiga trulo



Betontrabeto



Segilo /
Trapeza segilo



Surstabila ronda segilo




Kadrumo de pordo



Kaheloj



Pargeto



Kahel-tranĉilo



Kolonoj



Divid-muro



Gipsoplato



Maleo



Folioj por praktikado

La memorkapablo de simioj

Ĉimpanzoj uzas **ilojn**, ili havas amikojn kaj malamikojn, ili helpas **unu la alian**, kaj ili **eĉ** kuracas **siajn** vundojn. Tiuj estas kapabloj, kiujn oni dum longa tempo konsideris aparte homaj. Kaj nun al tiu listo **aldoniĝas** ankoraŭ **unu plia kapablo**: ĉimpanzoj povas memori la vizaĝojn de **iamaj** amikoj, eĉ de tiuj, kiujn ili ne vidis **de jardekoj**.

Tio montras, ke la memorkapablo de simioj pri la vizaĝoj de **eksaj** amikoj **foje** estas tre longa. Laŭ aliaj studoj, ĉe *Homo sapiens* la memoro pri la vizaĝo de konato komencas **malfortiĝi** post proksimume 15 jaroj. Kelkaj homoj tamen memoras **pli longe** la aspekton de homo, kun kiu ili iam havis fortan rilaton: eĉ 48 jarojn post la disiĝo.

Restas la demando, ĉu ĉimpanzoj kaj bonoboj sentas la mankon de siaj amikoj same kiel homoj. **Ŝajnas probable**, ke ankaŭ al simioj tia malproksimeco kaŭzas **animdoloron**.

> iloj

El sufijo "-ilo" indica un instrumento o una herramienta que sirve o se relaciona con la raíz indicada en la palabra. Veamos algunos ejemplos:

- *Kudri*: coser
- *Kudrilo*: aguja (instrumento que sirve para coser).
- *Manĝi*: comer
- *Manĝilo*: cubierto (instrumento para comer).

Recordemos que los sufijos, por sí mismos y con la terminación correspondiente, también pueden aparecer en una oración. Así, "*ilo*" por sí solo significaría: instrumento, herramienta. De este modo, la frase *ĉimpanzoj uzas ilojn*, podría traducirse como "chimpances usan herramientas".

> unu la alian

La frase *ili helpas unu la alian* se traduce como "ellos se ayudan el uno al otro". Los números nunca aparecen con la "-n" del acusativo.

> eĉ

Se trata del adverbio en español "incluso" o de la preposición "hasta", pero no con un sentido de lugar o de tiempo, sino de inclusión. Su lugar en la oración es muy importante, puesto que se coloca justo delante de la palabra a la que se refiere. Veamos algunos ejemplos y la importancia de su colocación:

- *Eĉ li opinias, ke la libro estas leginda*

Hasta él opina que el libro es digno de leer.

Es decir, mucha gente opina lo mismo "incluso él".

- *Li opinias eĉ, ke la libro estas leginda.*

Él opina incluso que el libro es digno de leer.

Él opina muchas cosas, entre ellas que el libro es digno de leer.

En el texto la traducción "*ili eĉ kuracas siajn vundojn*", puede traducirse como "ellos incluso curan sus heridas".

> siajn vundojn

El tema del pronombre "*si*" ya lo hemos tratado en multitud de ocasiones, pero no está de más volver a reiterarlo. Cuando en una frase aparece como sujeto cualquier pronombre de la tercera persona, bien sea singular o plural, es decir: *li, ŝi, ĝi, ili*, si en el resto de la frase se menciona algo referido a él, ya sea un posesivo o un complemento indirecto, entonces usaríamos el pronombre "*si*". Veamos algunos ejemplos:

- *Li donis sian libron al mi* Él me dio su libro

La correspondencia *li ↔ si* indica que el sujeto de la acción es "él" y el libro también es de él.

Sin embargo, si decimos:

- *Li donis lian libron al mi* Él me dio su libro

En este caso él ha entregado un libro de otra persona, no de él.

En otros idiomas, como el español, esta situación no queda clara, veamos el siguiente ejemplo:

- *Johano kaj Karlo promenis kun María. Johano sciigis pri lia amo al ŝi.*
Juan y Carlos pasearon con María. Juan le hizo saber de su amor hacia ella.

Si leemos la frase en español no sabemos a ciencia cierta, quién amaba a María. ¿Carlos o Juan? Por eso, lo más lógico es que en español dijéramos:

"Juan y Carlos pasearon con María. Juan le hizo saber del amor de Carlos hacia María."

Es decir, en español tenemos que indicar de alguna manera, si lo que se dice se refiere o no al sujeto.

En esperanto esta situación la aclaramos utilizando el pronombre "si", que siempre va referido al sujeto. Así:

- *Johano kaj Karlo promenis kun Maria. Johano sciigis pri sia amo al ŝi.*
Al usar "sia amo", entonces nos referimos al sujeto -Johano-.
- *Johano kaj Karlo promenis kun Maria. Johano sciigis pri lia amo al ŝi.*
Usando "lia amo" nos referimos a una persona distinta al sujeto, es decir a Carlos.

Es muy importante informar con exactitud en este tipo de frases, más que nada para dejarle las cosas claras a María. ☺

Así que la frase que aparece en el texto:

- *Ili eĉ kuracas siajn vundojn* se traduce como:
Ellos incluso curan sus heridas. Las heridas de ellos, naturalmente.

> **aldoniĝas**

Recordemos que el sufijo "-iĝ" convierte al verbo en reflexivo. Así, del verbo *aldoni* (añadir), derivamos el verbo *aldoniĝi* (añadirse).

> **unu plia kapablo**

Cuando empezamos con la gramática de la lengua internacional aprendemos que existe el artículo determinado "la", cuya traducción sería (el, la, los, las), pero no existe el artículo indeterminado (un, una, unos, unas). Así:

- | | |
|--|---|
| • <i>Mi aĉetis la libron</i> Yo compré el libro | • <i>Mi aĉetis libron</i> Yo compré un libro |
|--|---|

Entonces ¿por qué en algunas frases, como en la del texto, se dice "*unu plia kapablo*" -una capacidad más-? Bien, en este caso, y siempre que utilicemos "unu", estamos indicando que se trata de UNO o UNA referido al numeral, no a algo indeterminado.

Así, en el ejemplo que aparece en el texto "*unu plia kapablo*", el autor está indicando que es UNA capacidad más, es decir, no son DOS, ni TRES, ni CUATRO, es solo una capacidad la que se añade. Veamos el siguiente ejemplo:

- *Mi aĉetis unu libron.*

Yo compré un (1) libro.

El autor de la frase quiere dejar claro que compró solo un libro, no que compró un libro indeterminado. Recordemos también, que los números no toman la (-n) final del acusativo, por eso no decimos "*unun libron*", sino "*unu libro*".

> iamaj

Ya estudiamos en otro número el cuadro de voces simples. Se trata de un cuadro de estructura cartesiana, en el que van formándose palabras que toman su significado de la raíz y la terminación con la que cuentan. En el caso de "*iam*", está formado de "*i*" que en ese cuadro de voces simples indica algo indeterminado y de "*am*", que se refiere a tiempo. Así que *iam* significaría en algún momento, en algún tiempo, en algún momento.

Si además le añadimos la terminación "-a" lo estamos convirtiendo en adjetivo. De este modo, la frase *memori la vizaĝojn de iamaj amikoj* podría traducirse por "recordar los rostros de los amigos de entonces", o menos literalmente, *recordar los rostros de los que fueron en algún momento amigos*.

> de jardekoj

Recordemos que la preposición *de* no solo se refiere a distancia, sino también a tiempo. Se traduce por "de, desde". Así que *de jardekoj* podría traducirse por "desde decenios". Otros ejemplos:

- *Mi ne vidas vin de antaŭ kelkaj semajnoj.*

No te veo desde hace algunas semanas.

- *Mi ne vizitas vian urbon de la pasinta jaro.*

No visito tu ciudad desde el año pasado.

> eksaj

El prefijo *eks-* equivale al español "ex", indica algo que fue, pero ya no es. Como todo prefijo podemos convertirlo también en adjetivo, simplemente añadiéndole la terminación "-a". De este modo, obtenemos el adjetivo *eksa*, que tiene ese mismo significado "que fue pero ya no es". De este modo, la construcción que aparece en el texto "*la vizaĝoj de eksaj amikoj*", puede traducirse como "los rostros de los ex-amigos", o menos literalmente "los rostros de los que fueron amigos".

> foje

El sustantivo "*fojo*" (vez) podemos convertirlo en el adverbio "*foje*", cuya traducción sería "a veces". Podríamos decir que una graduación de lo que puede ocurrir en el tiempo sería la siguiente:

| | | | | | | |
|-------------|---|-------------|---|-------------|---|---------------|
| <i>ĉiam</i> | - | <i>ofte</i> | - | <i>foje</i> | - | <i>neniam</i> |
| siempre | | a menudo | | a veces | | nunca |

> malfortiĝi

En esperanto podemos usar prefijos, sufijos y también los dos juntos en una misma palabra. En el caso del verbo "*malfortiĝi*" encontramos el prefijo *mal-* que indica lo contrario de... Y posteriormente el sufijo *iĝ*, que se usa para formar el reflexivo de los verbos.

De este modo, *malfortiĝi* podría traducirse como "debilitarse".

> pli longe

Pli se traduce por "más", se trata de un adverbio que expresa una cantidad o un grado mayor referido a la palabra a la que acompaña. En este caso se refiere a "*longe*", que indica una larga duración de tiempo. Así, *pli longe* podría traducirse como "más duración de tiempo".

> Ŝajnas probable.

Lo podemos traducir como "parece probable". Recordemos la razón de usar el adverbio "probable" en vez del adjetivo "probabla".

El adjetivo (-a) se utiliza siempre que se quiera calificar un sustantivo, por ejemplo:

- *Mi antaŭvidas ĉiujn probablajn rezultojn de tiu investo.*
Yo preveo todos los resultados probables de esa inversión.

En la frase anterior, el adjetivo "*probabla*" se refería al sustantivo "*rezulto*". Sin embargo, cuando queremos calificar un verbo o una frase entera, no utilizaremos el adjetivo (-*a*), sino el adverbio (-*e*).

En la frase propuesta:

Ŝajnas probable, ke ankaŭ al simioj tia malproksimeco kaŭzas animdoloron.
Parece probable que también a los simios cause dolor anímico esa lejanía.

Probable se refiere a una frase entera: "*ke ankaŭ al simioj...*", por lo que no utilizaremos el adjetivo *probabla*, sino el adverbio *probable*.

Veamos algunos ejemplos más:

- *Mi jam konis la probablan finon de la filmo.*
Yo ya conocía el final probable de la película.
- *Estas probable, ke la direktoro vizitos nian oficejon baldaŭ.*
Es probable que el director visite nuestra oficina pronto.
- *La probabla rezulto de la konflikto estas katastrofa.*
El resultado probable del conflicto es catastrófico.
- *Probable vi atingos viajn revojn.*
Probablemente tú conseguirás tus sueños.


> **animdoloro**

Recordemos las reglas de unión de dos palabras, en este caso "*animo*" (alma) y "*doloro*" (dolor). En primer lugar sabemos que la palabra más importante es la última que aparece, así "*animdoloro*" no es un alma, es un dolor. Podríamos unir estas dos palabras del siguiente modo:

- *animo-doloro*: dolor anímico, dolor en el alma.
- *animdoloro*: tiene el mismo significado.

También podríamos usar "*anim-*" como un adjetivo y decir "*anima doloro*", seguiría teniendo el mismo significado.





Sur la pinto de monteto, ĉirkaŭigita de olivarboj, troviĝas, aŭ pli bone dirite, starigas la vilaĝo Iznatoraf, en la provinco Jaeno. Historiistoj kalkulas, ke tie jam ekzistis homa setlejo en la jaro tri mil a.K., ĉar la monteto estis tre utila por kontroli la vojon por atingi la minejojn en *Sierra Morena*. Dum la ibera periodo, tiu loko ankaŭ utilis kiel gvatejo. Tamen, post tiu epoko, tute certe la loko estis forlasita, pro la fakto ke neniu romia restaĵo troviĝis.

Islamanoj alvenis en la lokon kaj ili nomis tiun monteton kiel *Hisn at-Turab*, kies traduko estus "kastelo,

fortreso de la tero". Dum la 11-a jarcento ili konstruis muregon por defendi la lokon.

La kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la vilaĝon sen-lukte en la jaro 1235, tiel la islamaj enloĝantoj forlasis la lokon. Nova enloĝantaro venis de Kastilio. En la jaro 1252 la reĝo Alfonso la 10-a havigis Iznatoraf al la ĉefepiskopo de Toledo, kiu aljuĝis al la tiama vilaĝo la rangon de urbo.

La favora imposta reĝimo faciligis la alvenon de novaj enloĝantoj, kiuj okupis ne nur la monteton, sed ankaŭ la ĉirkaŭantajn ebenaĵojn. Ĉi tiuj lokoj, poste, fariĝis sendependaj vilaĝoj, kiel Villacarrillo.

Dum la regado de la toleda ĉefepiskopo, oni konstruis kastelon, kvankam ĝi vere ne utilis kiel fortreso sed kiel rezidejo. Nuntempe ĉi tiu konstruaĵo ne ekzistas. Depost tiam, Iznatoraf estas vilaĝo kies baza ekonomia rimedo de la enloĝantaro, proksimume 900 homoj, estas la olivoleo. La beleco de ties stratoj, multaj el ili ornamitaj per buntaj floroj estas bona kialo por turismi en ĉi tiu belega vilaĝo de la provinco Jaeno.



Blazono de Iznatoraf

Monumentoj

Paroka preĝejo de La Madono de Asuncion.

La ĉefa preĝejo de Iznatoraf estis konstruita fine de la 16-a jarcento sur pli antikva kristana templo, kiu, siafoje, estis islama moskeo. La preĝejo honorigas la ĉieliron de la Virgulino Mario, tiu estas la traduko de "*Asunción*" en la hispana lingvo. Ĉe la preĝejo estas vidindaj la ĉefa altaro kaj la kupolo super ĝi.

Domo de Ali-Menon.

Konstruita dum la 15-a jarcento sur unu el la turoj ankoraŭ ekzistantaj de la iama kastelo. Apud ĝi troviĝas la tiama malliberejo de la fortrerso. Ene de la domo ekzistas granda cisterno konstruita dum la islama epoko.

Arko de la strato Campo.

Temas pri unu el la enirejoj de la urbo, kiam ĝi estis ĉirkaŭigita de murego. Starigita dum la 13-a jarcento. Iznatoraf estis gardita de 11 turoj, do ekzistis 11 enirejoj laŭlonge de la murego. La arko de la strato Campo estas unu el tiuj enirejoj ankoraŭ ekzistantaj.

Puerta del Arrabal.

Alia enirejo al la urbo estas la *Puerta del Arrabal* (Pordego de la Antaŭurbo). Siatempe ĝi estis nepre pasejo por eniri en la centran placon de la araba kastelo.



Turo de la horloĝo

Apud ĝi troviĝas la turo *Mocha*, kiu estis la ĉefturo de la araba kastelo.

Festoj

La lasta tago de la monato aŭgusto, la religia bildo de Kristo de *Veracruz*, estas portata en la parokan preĝejon de la urbo. Komenciĝas tiam, la plej popularaj festoj en Iznatoraf dum preskaŭ unu semajno. Dum tiuj tagoj okazas koncertoj, konkursoj kaj dum-vespere taŭro-kuradoj tra la mallarĝaj stratoj de la vilaĝo.



Gastronomio

La tipa gastronomio de Iznatoraf baziĝas sur porkaĵo tradicie ellaborita. Konata estas la "ajla sango-kolbaso", kies baza produkto estas la porka sango. Kie en la tuta Jaena provinco, ankaŭ en Iznatoraf estas tre konata la pipirrana. Temas pri salato ellaborita per fritaj ruĝaj kapsikoj, oliv-oleo kaj salo.

Dumpaske, la tipa manĝaĵo estas "Kikeroj kun panetoj". Temas pri populara versio de la kikeroj akompanitaj de moruo, tamen ĉi tiu fiŝo estas anstataŭigita de kneloj preparitaj kun pano, ajlo kaj petroselo.

Oni preparas ankaŭ kuniklaĵon kun speciala saŭco, konata kiel "iznatorafa saŭco".

Venontnumere Turismi en ... **CORTEGANA (Onubo)**





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Rodrigo Vaquera la sevila poligloto enamiĝinta al esperanto

La partoprenantoj en la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Sevilo en la jaro 2023, tutcerte memoras tiun homon, laŭ-aspekte fragila, kiu finis sian paroladon per emociplena kaj kortuŝa krio: "*Vivu Esperanto*". Verŝajne, dum tiuj tagoj li sentis, ke lia vivo eskapis el si kaj pro tio li deziris partopreni, lastafoje, en esperantista festo en sia urbo Sevilo.

Li estis Rodrigo Vaquera Márquez, naskiĝinta en la jaro 1953. Tiuj plej maljunaj esperantistoj sendube memoras junulon, kiu iutage, komence de la 8-a jardeko, eniris en la Sevilan Akademion de Esperanto. Li poste asertis, ke la tago kiam li ekkonis la internacian lingvon kaj eniris en tiun antikvan sevilan sidejon, estis unu el la plej feliĉaj en sia vivo.

Rodrigo Vaquera estis sevilano, enamiĝanto al la lingvoj. Kiel dirite, komence de la 8-a jardeko de la pasinta jarcento, li eniris en la Akademion de Esperanto de la strato Sol en Sevilo, tiu loko kiu fariĝis la kerno de la disvastigo de Esperanto en la andaluzia ĉefurbo. Rodrigo rapide




Rodrigo Vaquera Márquez
1953 ~ 2024

lernis la lingvon kaj li tuj agadis kiel profesoro por la novaj gelernantoj de la Akademio. Li estis vera revolucio en la Akademio, li modernigis la maljunan klasĉambron, li pendigis dekojn da afiŝoj sur la muroj, tie estis eble legi, unu post la alia, la sufiksojn kaj prefiksojn de la zamenhofa lingvo.

Rodrigo ĉiam estis preta disvastigi la lingvon en Sevilo, pere de leteroj senditaj de li al ĵurnaloj kaj pere de intervjuoj kun ĵurnalistoj kiu, kuriozoplene, frapis la pordon de la Akademio de Esperanto kun la celo scii *kio estas tio pri Esperanto*.

Li diplomiĝis en rusa lingvo en la Universitato de Jarkov kaj en la Instituto Puŝkin de Moskvo. Li, krome, studis la kroatan kaj la slovenan lingvojn en la Universitato de Zagrebo. Li sekvis kursojn pri la pola lingvo en Madrido kaj en Lisbono



Klasĉambro en la Akademio de Esperanto en la strato Sun' en Sevilo.
Tie Rodrigo Vaquera instruis la internacian lingvon dum kelkaj jaroj.,

Sed, Rodrigo ne nur estis esperantisto, tamen ni ne diru, ke li estis poligloto. Laŭ difino, poligloto estas homo kapabla uzi plurajn lingvojn, tamen li ne estis tia. Rodrigo ne nur uzis diversajn lingvojn, li vere enamiĝis al ĉiuj ili. En la Universitato de Sevilo li finis studojn pri hispana filologio en la jaro 1987, pri germana filologio en 1995 kaj pri itala lingvo en la jaro 2000. Poste, en Madrido li finis siajn studojn pri rusa filologio en la jaro 2007. Li ankaŭ studis la francan lingvon en Parizo, la germanan en Munkeno kaj la italan en la Universitato de Perugia.

kaj diplomiĝis en lingvo araba en Tetuano (Maroko). Li studis la ĉeĥan lingvon en la Universitato de Prago kaj en Madrido li sekvis kursojn pri la hinda, la turka kaj la svahila lingvoj. Fine, li fariĝis licencita tradukisto de la hispana Ministerio pri Eksteraj Lingvoj de la portugala lingvo. Kiel dirite, poligloto kapablas paroli en diversaj lingvoj, tamen estus necese trovi alian vorton por tiuj, kiuj ne nur parolas, sed amegas la lingvojn.

Tiuj ni, kiuj bonŝance konis Rodrigo, ne forgesos siajn konversaciojn, kie

gramatiko de unu aŭ alia lingvo ĉiam devenis la ĉefan temon de la parolado, kaj ofte kompare al Esperanto, lingvo vere amata de li.

En la tempo-distanco, Rodrigo, ni dankas, ke vi iutage vidis la verdan stelon pentritan sur antikva konstruaĵo de la strato Sol en Sevilo, kaj vi ne dubis eniri tien, por demandi kio estas Esperanto. Dankon ĉar ĝis via lasta vivotago, vi estis esperantisto kaj vi eĉ eterne disvastigos la internacian lingvon, pro la elekto de frazo gravurita sur via tombo-ŝtono. Tiu krio de vi dirita dum la hispana kongreso de Sevilo, la lastan fojon kiam ni havis la plezuron vidi vin: **Vivu Esperanto!**



Tombo-ŝtono de Rodrigo Vaquera. Eterne li proklamas sian inmensan amon al esperanto.




Antolín Colmenar kaj Rodrigo Vaquera, senlacaĵ agantoj en la Akademio de Esperanto en la strato Sol (Sevilo)



Rodrigo Vaquera, partoprenanto en la Hispana Kongreso de Esperanto de la jaro 1981 - Murcio.



Esperanto – La lingvo internacia



$$E = mc^2$$

Scienca Angulo

Ĉu balenoj uzas propran lingvon?

Post pristudi, el statistika vidpunkto, la sonojn elsenditajn de la ĝibaj balenoj, sciencistoj identigis sonsekvencojn, kiuj povus esti similaj al frazoj en la homa lingvo. Krome, ĉi tiuj sonoj sekvas kelkajn regulojn de la tiel nomata "Leĝo de Zipf", inter ili, ke la dua vorto, aŭ sono se oni parolas pri balenoj, plej uzata aperas en "konversacio" duone ol la unua vorto aŭ sono. Same, la tria vorto aperas trione kaj tiel plu. Ĉi tio okazas ne nur en la homa lingvo, sed ankaŭ rilate sonojn en balenoj.

Alia regulo proponita de George K. Zipf, lingvisto de la Universitato de Harvardo, asertas ke la vortoj plej uzataj en lingvo estas ankaŭ la plej mallongaj. Tio same okazas rilate sonojn de la ĝibaj balenoj.

Laŭ tiuj studoj, sonoj elsenditaj de balenoj formas longajn sekvencojn, kiuj povus esti similaj al niaj frazoj. Tiuj frazoj formas aliajn pli grandajn, konataj de la sciencistoj kiel "temoj", kiuj eldiritaj de la balenoj aperas kiel kantaĵoj.

Do, la demando estas jena: *ĉu balenoj uzas reale lingvon por komuniki inter si?* Sciencistoj ne havas dubojn, pri la fakto, ke balenoj povas komuniki inter si laŭ sonoj jam konataj, tamen ĝis nun, nur homoj kapablas krei senlimajn lingvajn skstrukturojn, pere de la aplikigo de gramatikaj reguloj, kaj ne nur de simpla ripetado de sonoj.



Tamen, se ne temas pri lingvo, oni povas diri almenaŭ, ke balenoj havas komunikilon. Fakuloj asertas, ke tiu komunikilo estas komparebla al homa muziko, kiu sekvas statistikan strukturon, kaj la signifo de tiuj sonoj, aŭ tiu "muziko", estas komprenata de la balenoj.

Ĝis nun, sciencistoj pristudis la oftecon de tiuj sonoj, kaj eĉ de la silentoj ekzistantaj inter la sonoj. Laŭ ĉi tiuj studoj, la procezo por kompreni tiujn sonojn estas tute simila al tio, kio okazas ene de la cerbo de infanoj, kiu komencas aŭskulti sonojn, ankoraŭ ne komprenataj kiel vortoj, kaj ili poste ripetas tiujn sonojn.

Ezemple, se infano deziras "akvon", li ne kapablas scii, ke tio estas vorto, li nur ripetas sonojn antaŭe ofte aŭskultataj. Do, kompreni kion diras balenoj estas tute egale, se tiuj sonoj estas elsenditaj kiam okazas konkretaj aferoj, ekzemple: danĝero, abunda manĝaĵo ktp, tiuj sonoj povus havi konkretan signifon, akorde al tiuj cirkonstancoj.

Kompreneble, ĉi ĉio ne estas tiel simpla, tamen la ofta uzado de tiuj ripetataj sonoj helpas kompreni, ke komunikiloj aperas spontanee ĉe kelkaj specoj, ĉar ties uzado kaj komprenado havigas avantaĝojn al tiuj specoj, ĉefe por garantii la supervivadon.

Humuro



Vi kontaktis kun la oficejo de la Babel-turo. Se vi deziras daŭrigi la konversacion en la

- | | |
|----------------------|----|
| lingvo akada premu | 1. |
| Lingvo sumera premu | 2. |
| Lingvo hebrea premu | 3. |
| Lingvo persa premu | 4. |
| Lingvo asiria premu | 5. |
| Lingvo egipta premu | 6. |
| Lingvo etruska premu | 7. |
| Lingvo greka premu | 8. |
| Lingvo fenica premu | 9. |

.....
Lingvo aramea premu 1248.





Flamenko

La Paquera de Jerez

Kvartalo San Miguel en Jerezo estas unu el la ĉefaj luliloj de la flamenka arto. Tie, preskaŭ ĉiuj najbaruloj kapablas kanti buleriojn, eĉ se tion ili ne faras profesi-nivele. En tiu kvartalo naskiĝis en la jaro 1934, Francisca Méndez Garrido. La post-militaj jaroj en Andaluzio estis teruraj. Nek ŝi, nek ceteraj ok fratoj ĉeestis la lernejon, ili, jam infan-aĝe, devis atingi monon por sia malriĉega familio. Francisca plenumis tian devon pere de la flamenka kantado. Ŝia propra avo donis al ŝi la nomon "*Paquera*", ŝi nur devis aldoni la nomon de sia naskiĝ-vilaĝo, kaj tiel ŝi estis konata ene de la flamenka mondo kiel "*La Paquera de Jerez*".

Jun-aĝe ŝi komencis kanti en teatroj de Jerez, tie ŝi ricevis la kromnomon "*La Reĝino de la Bulerioj*", tiu vibranta, spontanea kaj festa flamenka kantaĵo, kiu naskiĝis en Jerez. Poste, ŝi partoprenis en Madrido ene de flamenka spektaklo de la fama dancistino Matilde Coral. En 1953 La Paquera jam registris sian unuan diskon, plena de bulerioj kaj tientoj kaj en la jaro 1956, ŝi estis la ĉefa stelo de la plej grava flamenka spektaklejo



Francisca Méndez Garrido
La Paquera de Jerez
1934- 2004

en Madrido "El Corral de la Morería". Fine de la 50-aj jaroj, ŝia kantaĵo "*Maldigo tus ojos verdes*" estis la plej populara kantaĵo elsendita en la hispanaj radioj. Estas necese diri, ke La Paquera sciis nek legi, nek skribi, do, la tekstoj kantitaj devis esti parkerigitaj de ŝi.

En la jaro 1959 ŝi fondis sian propran flamenkan spektaklon "*España por Bulerías*", ŝi trakuris ĉiujn hispanajn teatrojn. Bulerioj, kantitaj kun la forta

kaj vibranta voĉo de La Paquera, kune kun siaj personaj karakterizaĵoj kaj ritmoj, alportis novan vivon al la tradicia flamenko.

La Paquera verŝajne estis la plej konata flamenka kantistino dum la dua duono de la pasinta jarcento. La famo eĉ trapasis landlimojn, tiel, en la jaro 2002 li decidis kanti en Japanio. Tiam, en la orienta lando flamenko estis ekkonata. La tiama ĉefministro ĉeestis unu el la spektakloj kaj, laŭdire, li emocie eksploris post aŭdi al La Paquera de Jerez. Vere, la flamenka arto estas komprenata en la tuta mondo.

La Paquera forpasis en la jaro 2004. Oni diras, ke tiu tago en Jerez eĉ la sonoriloj de la preĝejoj sonis laŭ buleria stilo.



Aŭskultu bulerion de La Paquera de Jerez en Youtube eĉ

<https://www.youtube.com/watch?v=NKRIKtjQCYU>

*Mia nigra, nigra hararo,
mi jam ne bezonas ĝin,
se mi ne havas viajn manojn
silke karesantaj min.*

*Mia korpo, kiel bruna floro
jam ne utilas al mi,
se min turmentas angoro,
ĉar ĝi ne estos por vi.*

*Min ŝiras granda dolor',
kiu estas kiel pasia kruc',
malbenataj estu viaj verdaj okuloj,
ve viaj verdaj okuloj,
malbenata estu via kor'.*



Fervojista Angulo

La "Angla Linio" de Almerio

En la jaro 1868 oni aprobis en Hispanio la Leĝon pri Minejoj. Ĉi tiu nova regularo faciligis la koncesiojn por ekspluati minejojn al unuopuloj kaj al eksterlandaj kompanioj. Kelkaj eŭropaj ŝtatoj, kiel Francio, Britio kaj Germanio, bezonis mineralojn por siaj industrioj, kaj en Hispanio fero kaj karbo abundis. En la andaluzia provinco Granado ekzistis minejoj pri fero, pri la plej granda el ili, tiu de Alquife, ricevis koncesion la brita kompanio *The Alquife Mines & Railway Co Ltd.*



Minejo en Alquife (Granado)
en la komenco de la 20-a jarcento

La mineraloj, tie eltiritaj, vojaĝis poste en britajn industriojn, kiuj produktis ĉefe ŝtalon. La transportado el la granada minejo ĝis la haveno de la urbo Almerio, fariĝis per vagonaro, kaj de tie per-ŝipe en Brition. Tamen, la plej multekosta kaj malrapida afero estis la transportado de la stacidomo ĝis la haveno en la urbo Almerio.

Ĉi tiu transportado, apenaŭ kelkaj kilometroj, fariĝis pere de ĉaroj trenitaj de muloj. La mineja kompanio serĉis tuj alian rimedon por transporti la mineralon en la almerian havenon.

En la jaro 1903, la brita konsulo en Almerio, S-ro Algar E. Carleton, proponis konstrui grandan ŝarĝadejon en la haveno de Almerio por ricevi la mineralon. La celo estis plirapidigi la ŝarĝadon de la ŝipoj, kiuj poste transportis la mineralon. La projekto estis aprobita, kaj tiel nur unu jaro poste, la nova ŝarĝadejo estis fin-konstruita. Ĉi tiuj novaj instalaĵoj ebligis la ŝarĝadon de ŝipo de 8000 tunoj nur post 10 horoj, antaŭe estis necesaj, por tiu sama operacio, inter 8 kaj 10 tagoj. La nova ŝarĝadejo ricevis la nomon "*El Cable Inglés*" (La angla linio).

Kvankam en la unua projekto la materialo uzota por la konstruo de la ŝargadejo estus lignaĵo, fine oni uzis metalon. Entute, preskaŭ 4000 tunoj de ŝtalo. Sur instalaĵo trakuris fervoja linio de 1056 metroj, kiu unuigis la almerian stacidomon kun la haveno. La linio eniris en la maron ĝis 900 metroj.

Ĉi tiuj novaj instalaĵoj estis pli malgrandaj ol tiuj unue konstruitaj, krome ili eniris en la maron nur 300 metroj kaj por ties konstruado oni uzis betonon, ne metalon.

La "Angla Linio" funkciis ĝis la jaro 1970. Tiam, la malgranda monprofito atingita de la mineraloj,



La "Angla Linio" en la haveno de Almerio, tuj post la konstruo

Sur la reloj cirkulis vagonaroj plene ŝarĝitaj de mineralo, kiuj malŝarĝis la varojn en kestegojn, kaj de tie rekte en la ŝipon. Por ĉi tiuj operacioj oni uzis nek gruojn, nek motorojn, simple la gravito faciligis la faladon de la mineraloj de unu lokon en alian.

La skota mineja kompanio *Bairds Mining Co Ltd*, kiu ankaŭ atingis koncesiojn en la granadaj minejoj, decidis konstrui alian ŝargadejon por siaj ŝipoj. Ĝi stariĝis je 500 metroj de la angla linio, kaj ĝi estis baldaŭ konata kiel "la franca linio".

provokis, ke iom post iom, la produktado falis. En tiu jaro, oni ŝarĝis lastafoje ŝipon per mineralo.

Depost tiam, komenciĝis en la urbo Almerio debato pri la estonteco de la instalaĵoj. Kelkaj opiniis, ke la plej taŭga solvo estus malkonstrui la ŝargadejon, pro la fakto, ke temis pri granda kaj ne-utila metala instalaĵo en la haveno, kiu malbeligis la pejzaĝon apud la maro. Male, aliaj opiniis, ke temis pri granda inĝeniera konstruaĵo, kiu povus esti profitata por aliaj aferoj. Fine, en la jaro 1998 la andaluzia

registaro deklaris la "anglan linion" kiel kulturen havaĵon de Andaluzio, ĉar ĝi estis ekzemplo de historia industria riĉeco de la Aŭtonoma Komunumo.

Nuntempe, vagonaroj ne cirkulas sur ĉi tiu strukturo, sed homoj, kiuj uzas ĝin kiel allogan promenejon, el kie eblas vidi la belecon de la urbo Almerio de la maro.



La "Angla Linio" nuntempe

fervojista@esperanto.ac
https://hafe-19.websself.net

TTT-paĝo de Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj



***Ĉu vi deziras kunlabori kun
GAZETO ANDALUZIA ?***

***Ni bonvenigas viajn artikolojn, fotojn,
desegnaĵojn, informojn ktp***

Kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

Ĉu
mi estas

Homo

aŭ

Maŝino ?

Jen la nekredebla historio de eksa homo kaj nuna maŝino.



Jen mi. Mi revis pri ĉi tiu momento dum la pasintaj du jaroj. Mi estis ĝuste ĉe la pordo de la hejmo de Diana. Mi tintis la sonorilon kaj mi atendis. Mi ne sciis, ĉu tio, kion mi faris, estis korekta. Baldaŭ, mi trovis la respondon...

Ĉu ?

Saluton, Diana!



Ŝi rigardis min kuriozoplene, mi atendis ŝiajn vortojn.



Pardonu, sed mi ne konas vin.

Ĉu vere Diana? Mi estas Roger.

Ŝi tuj paliĝis, eble miaj vortoj vundis ŝin.



Ne diru stultaĵojn! Roger forpasis antaŭ du jaroj pro aŭtoakcidento

Jes! Sed jen mi. Mi revenis

Ne, tio estas tute ne-ebla! Kredu min. Mia papilio.



Tiam, mi vidis grandan surprizon sur ŝia vizaĝo. Nur mi nomis ŝin "Papilio".



Papilio? Kion vi scias pri tio?

Ĉar mi estas Roger Alf Sidiĝu kaj mi klarigos ĉion al vi.

Ĉio komenciĝis antaŭ du jaroj. Mi stiris mian aŭton, eble tro rapide, kiam post forta kurbo mi koliziis kun granda kamiono.




Subite, ĉio fariĝis nigra ĉirkaŭ mi. Mi nenion vidis, nenion aŭdis, nenion sentis. Mi estis en tute vakua spaco. Sendube mi falis morta. Tamen, mi povis pensi kaj memori.



Kiom da tempo pasis? Mi ne scias. Ĉu tio estis la morto? Mi ankaŭ ne sciis. En tiuj momentoj mi povis fari nenion, nur pensi kaj imagi vin. Kion vi farus? Kiel vi fartus? Kie vi estus?




Eble pasis tagoj, semajnoj, eĉ monatoj. Mi povis nur revii pri vi. Tamen intage mi sentis ion. Subita frapiĝo kiel vibrado.



Mi enprofundiĝis en tiu vibrado, tamen nenio okazis. Tamen post tio, mi sentis min resti kvazaŭ pendanta en la aero, kiel ene de plena akvujo.



Tiam, mi sentis novan vibradon ĉi-foje pli intensan kaj akompanitan de sono. Temis pri tre lontana sono, simila al tintilo, mi aŭskultis tion du-foje.



Kaj subite mi aŭskultis voĉon. Mi deziris plori. Mi estis akompanita !

Roger Alf, se miaj kalkuloj estas ĝustaj, nun vi povas aŭdi min. Mi estas la profesoro Hugo Nelson.




Jes, mi povis aŭdi, sed nenio pli. Mi volis vidi, tuŝi, spiri. Sed mi povis nur fari tion: Aŭskulti

Roger, dum la lastaj kvin monatoj mi faris eksperimentojn kun vi. Sciuj, ke via korpo estas mortinta, tamen mi konservis vian cerbon vivan. Do vi vivas.



Vi mortis pro aŭto-akcidento, tamen tre proksime troviĝis mia laboratorio. Do, ni prenis vian cerbon por teni ĝin viva. Ho! Apude estas mia kunulo D-ro Klan.

Saluton, Roger !



Mi aŭdis du voĉojn kaj mi sukcese komprenis iliajn vortojn.

Dum la lastaj kvin monatoj ni konstruis aparaton, kiu funkcias tute same al homa aŭdo-senso. Do, ni sendas en vian cerbon la necesajn vibradojn, kun la celo esti aŭskultataj.



Post unu monato, verŝajne li jam povos vidi. Tuj poste ni eklaboros cele atingi la tuŝosenson. Kaj iom post iom, li sentos ĉion.



Mi estis tre kontenta. Mi jam ne estis tute sola, mi kapablis aŭskulti la konversaciojn inter la profesoroj. Ili eĉ aŭskultigis muzikon al mi.

Ĉio preta, Roger!



Post kelkaj minutoj, ni konektos kablون, kiu funkcios kiel via opta nervo. Vi povos vidi!



Do, estu preta Roger! En la komenco ĉio aperos strange, ĉar bildoj ne estas similaj al tiuj, kiujn vi memoras. Tamen post kelkaj minutoj ĉio normaliĝos.



Mi atendis pacience. Mi aŭskultis la sonon de kabloj konektitaj, de konversacioj inter la profesoroj, kaj subite! bildojn similajn al tiuj de la antikvaj televidoj mi kapablis vidi.



Cu vi kredas, ke li povas vidi nin?

Tion mi esperas, tamen ni devos atendi, ĝis kiam li kapablos paroli.



Jes! Jes! Mi kapablas vidi vin. Daŭrigu vian laboron. Mi havas tiom da demandoj!

Mi pensis ion.



La profesoroj komencis paroli pri la maniero kontakti rekte kun mi. Mi ne komprenis iliajn teoriojn. Tamen mi estis espero-plena.



Jes, vi pravas. Ni povus konstrui ion simila al voĉo-registrilo.

...kontrolita de elektrolitoj en lia mjelo.

Tiuj teorioj, kiujn mi sukcese aŭskultis, ŝajnis al mi tre strangaj. Tamen, mi kredis firme je ili, se ili sukcesis kaj mi povus vidi, paroli kaj senti denove.

Ni komencu labori tuj!

Mi havas surprizon. Mi jam konstruis ĝin.



Mi kapablis vidi la profesoron preni strangan maŝinon el ŝranko.

La impulsoj elsenditaj de lia cerbo estos transformitaj de la registrilo en sonojn

Do, ni povus vidi nun, se ĝi bone funkcias.



"Jes, tuj", mi deziris krii. Bonvolu, konekti la maŝinon al mia cerbo jam!

Nur estos necese konekti la anodon kun la ĉefa cerba nervo.

Jen ĝi!



La profesoro prenis mikrofonon kaj parolis...

Roger! Ni konektis registrilon kun via ĉefa cerba nervo. Ni deziras fari eksperimenton.

Mi faros kelkajn demandojn. Por respondi *JES* sendu du impulsojn; se *NE* sendu unu impulsojn el via ĉefa nervo.



Mi sentis konekton de kablo kun kun mia nervo. Stranga sensaco.

Do, Roger. Ĉu vi aŭdas min?



Kion mi devis fari? Kiel mi povus sendi impulson?

Roger, ĉu vi aŭdas?

Roger, du impulsojn !



Mi plifortigis miajn pensojn. JES, JES! mi volis krii.

Roger! Respondu!

bip, bip



La eksperimento sukcesis. Post du horoj da novaj demandoj, ili povis alĝustigi frekvencojn, kurentojn kaj elektrolitojn.


Nun, pensu per viaj propraj vortoj, espereble la registriilo povos ŝanĝi viajn impulsojn en sonojn.



Dum la venontaj monatoj mi relernis paroli. Komence mi ŝajnis esti infano komencanta diri siajn unuajn vortojn. La profesoroj ne ĉesis sian laboron por krei korpon al mi.

Profesoro, kiam mi havos korpon?

Estu pacienca, Roger! Ni ankoraŭ devas solvi multajn aferojn.



Mi kapablis vidi la konstruon de mia nova korpo. Farita el plastiko ekstere, interne troviĝis ostoj el metalo kaj elektro-magnetaj muskloj.

Jen la Centra Proceza Unuo, ligita al via mjelo per miloj da kabloj.



Via cerbo estos konektita al ĉefprocesoro per relajsoj. Viaj elektro-magnetaj impulsoj ebligas al via korpo fari ĉion. Vi povos promeni, vidi, paroli, skribi, salti ... ĉion !

Sed, atentu Roger! Vi nepre devas prizorgi ekstreme vian cerbon. Ĝi devas esti mergita ĉe speciala fluido, kiu bezonas oksigenon por regeneri sin. Same, atomenergia baterio havigos al vi energion. Eble ĉi ĉio produktos sonon aŭdebla ĉirkaŭe.



Vi povos vidi per du kameraoj, kaj aŭdi per du registriroj. Vi aspektos kiel eble plej homa.



Mi estis ege kontenta. Mia nova korpo estis fin-konstruita kaj mi aspektis kiel vera homo.

Roger, vi bezonas nur paciencon por lerni movi viajn muskolojn.



Mi agis kiel infano. Unue mi movis miajn brakojn, poste mi stariĝis kaj ekmarŝis

Bone, Roger
Tre bone!



Tiel, du jarojn post mia akcidento, mi jam estis preta eliri denove en la mondon.

Roger, morgaŭ vi jam povos eliri.

Bonege!



Kiam mi eliris el la laboratorio, mia unua penso estis vi: Diana. Mi prenis trajnon por viziti vin.

Vidu tiun viron, panjo. Li aspektas kiel roboto.

Ŝŝŝ! Karlo
Estu respektema!



Kaj jen mia tuta historio, mia kara papilio. Antaŭ vi troviĝas metalo, plastiko kaj la cerbo de Roger Alf.

Roger, mi ne scias kion diri.



Mi amas vin, Roger. Sed unu jaron post la akcidento, mi konis al Bob.

Bob?



Bob estas mia edzo.



Edziniĝita! Diana edziniĝis.

Sed vi revenis, Roger.
Mi divorcos de Bob.
Mi volas esti kun vi.

Edziniĝita!
Mi ne pensis
pri tio.



Mi neniam pensis, ke por Diana mi mortis, jes mi mortis. Ŝi komencis novan vivon... sen mi.

Mi amos vin ĉiam, Roger!

Mi...



Ĉu vere? Ĉu ŝi ankoraŭ amis min? Ŝi parolis pri tua divorco de Bob.

Ne, Diana ne! Mi estis frenezulo
Mi ne kapablis pensi pri tio.

Nun, ni
estas denove
kunaj.



Kio mi estis apud Diana? Nur plastiko kaj metalo. Vere, ŝi meritis multe pli, normala homo, ne mi.

Pardonu min. Ĉi ĉio estis
granda eraro.

Kion vi
diras?



Jen la sola kaj ĝusta eliro.

Pardonu min Diana. Mi estas reala,
tamen mi estas apenaŭ roboto. Mi vidas
nun, ke Roger Alf mortis.

Ne,
ne diru
tion!



Mi adiaŭis ŝin, mi fermis la pordon kaj eniris en malluman straton. Mi nun revenos en mian hejmon, la laboratorio kun la profesoroj.

Gis la!
Mia papilio



FINO

nun ni

junulara paĝo



La Esperanto-klubo de la germana urbo Hameln, jes la urbo de la flutisto kaj la kurantaj ratoj, organizis konkurson de kantoj en esperanto. En ĉi tiu ret-paĝo vi povos vidi kaj aŭdi resumon kun la 50 unue elektitaj:

https://www.youtube.com/watch?v=Z18_Rv_CjZs

Kaj jen la kanto, kiu gajnis la konkurson. Temas pri la registita *DANKON* de Jonny M.

https://www.youtube.com/watch?v=_T1u5Tq6jsU



Jonny M.



Skubi-Du en esperanto! Fred, Dafne, Velma, Ŝagi kaj la danhundo Skubi-Du konsistigas amatoran detektiv-grupon, kiu serĉas misterojn. Strangaj misteroj, malaperoj kaj fantomaj vizitoj ĉiam troviĝas en la epizodoj de ĉi tiu fama usona serio.

Kaj nun en esperanto !

Videblas ĉe
<https://xn--esperao-tgb.net/serioj/skubi-du-kompanio-mistero/>



ŜAKO

Malfermoj



En ŝakludo la komencaj movoj estas konataj kiel *malfermo*, ankaŭ *defendo* se temas pri la unuaj movoj de la nigraj. Oni povas diri, ke ĉi tiu komenca fazo de ĉiu matĉo estas la plej grava, ĉar ĝi difinas la pecojn uzitajn por ekludo kaj la lokojn uzitajn de ĉiu ili.

Ekzistas centoj, se ne miloj, da malfermoj, kaj ĉiu grava ŝakluda majstro preferas unu aŭ alian. Fakuloj pri ŝakludo klasifikas malfermojn laŭ jenaj kriterioj:

- Malfermitaj malfermoj.

La ludo komencas per la movo 1.e4 e5.



- Duonmalfermitaj malfermoj.

La ludo komencas per la movo 1.e4 kaj nigraj respondas aliamaniere ol e5.



- Fermitaj malfermoj.

La ludo komencas per 1. d4 d5





- Duonfermitaj malfermoj.
La ludo komencas per la movo 1. d4 kaj nigraj respondas aliamaniere ol d5.



- Flankaj malfermoj.
Blankaj komencas per movo de peono malsimila al 1. e4 aŭ 1. d4



- Neregulaj malfermoj.
Tiuj ne inkluditaj en la antaŭaj grupoj, ĉi tiuj malfermoj estas vere strangaj, ekz. movi la ĉevalon antaŭ ol peono.



La Enciklopedio de Ŝakaj Malfermoj (*Encyclopedia of Chess Openings*) pristudas en siaj kvin volumoj ŝakajn malfermojn, post analizi centojn da miloj da ludoj inter ŝakludaj majstroj.

La plej oftaj malfermoj estas tiuj malfermitaj aŭ fermitaj. Laŭ fakuloj pri ŝakludo, malfermitaj malfermoj estas la plej popularaj kaj potencaj. Tiel, pere de 1. e4 e5, blankaj tuj regas la centron de la kvadrato kaj liberigas du ŝakpecojn: damo kaj kuriero. Tamen, aliaj opinias, ke kiam blankaj movas 1 e4 , la peono restas tie en sendefenda pozicio. ***Kion vi opinias?***



Andaluza Kuirarto

Karotoj laŭ andaluza stilo

Karoto estas manĝebla radiko, normale oranĝkolora. En Andaluzio ĉi tiu legomo estas la bazo de kelkaj tipaj receptoj, kiu ofte akompanas aliajn manĝaĵojn. Karotoj aperas en supoj, stufajoj, salatoj kaj eĉ en kukoj.

Hodiaŭ ni parolos pri karotoj laŭ andaluza stilo. Temas pri peklaĵo spicita per vinagro kaj kumino, ingredientoj el kiuj ĉi recepto ricevas acidan kaj ekzotan guston. La recepto estas tre simpla kaj facile kuirebla en 15 minutoj.



Ajlo / ajlero



Petrosele



Salo



Oliv-oleo



Vinagro



Kumino

Jen la ingrediencoj por 4 homoj:

- 6 aŭ 7 karotoj, sufiĉe dikaj.
- 2 ajleroj.
- Oliv-oleo
- Vinagro
- Oliv-oleo (150 ml).
- Kumino (1 kulereto)
- Salo.
- Petrosele



Karotoj

Jen la preparado:

- 1) Distranĉu la karotojn en pecojn.
- 2) Dum 5 minutoj varmigu la karotojn ene de akvo. Aldonu iomete da salo. Atentu, la rezulto ne devas esti karotoj ege malmolaj. Ili devas kraki.

BONAN APETITON !



3) Dum la karotoj varmigas, ekpreparu la peklaĵon. Metu ene de pistujo:

- ajlerojn (2).
- Salon.
- Kuminon (1 kulereto).

Ankaŭ oni povas enmeti cepojn distranĉitajn en tre malgrandaj pecoj.



Pistu ĉion per ripetataj kaj fortaj batetoj. Dum la pistado aldonu iomete da oliv-oleo kaj vinagro.



4) Post la fino de la varmigo, degutigu la karotojn.



5) Ankoraŭ varmaj la karotoj, verŝu la preparitan pistaĵon super ilin. Pli bone, se la karotoj ne malvarmiĝis.



6) Miksigu sufiĉe bone karotojn kaj pistaĵon. Dum 2 horoj la kuirado devas resti en fridujo. La rezulto estas taŭga akompananto de viando aŭ fiŝoj.





Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

"Las Camachas" Sorĉistinoj en Montilla

Leonor Rodríguez naskiĝis en la vilaĝo Montilla (Kordova provinco) en la jaro 1532. Tradicie ŝi estis konata kiel *La Camacha*, pro la nomo de ŝia avo, Antón García Camacho, konata gastejestro en la vilaĝo.

En la urbo Granada, Leonor ekinteresiĝis pri aferoj rilataj al herboj, unĝventoj kaj sorĉoj. Laŭdire, ŝi konis 35 sorĉajn preĝojn, kiuj kapablis stiriligi virinojn aŭ fari virojn impotentaj. Miguel de Cervantes, en sia verko *El Diálogo de los Perros*, rakontis, ke *La Camacha* kapablis obskurigi la sunon, transporti homojn de unu loko en alian, maturigi tritikon en januaro, florigi rozojn en vintro kaj konverti homojn en bestojn. Do, la famo de Leonor Rodríguez kiel sorĉistino estis tre disvastigita, eĉ tiuj virinoj kiuj deziris koni pri tiuj aferoj estimis multe ŝiajn instruojn.

Iutage, venis en la gastejon de la familio Camacho en Montilla, riĉa bien-posedanto, Senjoro Alonso de Aguilar. Li petis al Leonoro helpon por tromp-logi belan virinon, Mayor de Solier.



Ŝajnas, ke la ensorĉo bone *funkciis*, tiel Mayor de Soler graviĝis. Laŭ aliaj popolaj komentoj, reale tiu estis la deziro de la patrino de Mayor de Soler, kiu deziris parenĉi kun tiel riĉa familio, kaj pro tio, ŝi mem faciligis la am-rilatojn inter la bienulo kaj sia filino. Tamen, por eviti la hontajn onidiraĵojn de tiu gravedo, ŝi tuj diris, ke temis pri ensorĉo de *La Camacha*.

La afero baldaŭ estis konata de pastro en la vilaĝo. Li ne dubis informi pri tio al la Inkvizicio. Tiel, komenciĝis jura proceso dum kiu oni asertis, ke pli ol 50 homoj petis sorĉajn helpojn al Leonor. Eĉ 22 atestantoj certigis tion en siaj deklaroj antaŭ eklezia tribunalo.

La Camacha estis enkarcerigita kaj torturita. Kompreneble, post tiuj kruelaĵoj ŝi konfesis, ke ŝi estis sorĉistino. La inkvizicia tribunalo rekviziiciis ŝiajn havaĵojn, krome ŝi estis kondamnita pagi 150 dukatojn kaj ricevi 100 vipo-batojn en Kordovo kaj aliajn 100 en Montilla.

Post la kondamno, ŝi loĝis en la urbo Kordovo. Tie, ŝi tenis prosperan negocon pri ŝtofoj kaj drapoj. Post kelkaj jaroj, ŝi ricevis siajn havaĵojn

rekviziciitajn, kaj oni permesis al ŝi reveni en Montilla. Tie ŝi mortis en sia 53-a vivo-jaro.

Leonor Rodríguez ne estis la sola virino en sia familio kaj vilaĝo akuzita kaj kondamnita pro ensorĉaj aferoj. Suferis ankaŭ punojn ŝia fratino Catalina, kaj aliaj virinoj en Montilla, kiel María Sánchez, Mayor Díaz, Isabel Martín kaj Isabel Hernández. Ĉi tiu aro da sorĉistinoj ricevis la komunan nomon de *Las Camachas*.



Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto de Elizabeto la 2-a.

Ĝi unuigas la urbon Sevilon kun ties kvartalo Triano, super la rivero Gvadalkiviro.

Konstruita en la jaro 1852.



| | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | |
| 2 | | | | | | ■ | | |
| 3 | | | | | | | | |
| 4 | | | | ■ | | | | |
| 5 | | ■ | | | ■ | | ■ | |
| 6 | | | | ■ | | | | |
| 7 | | | | | | | | |
| 8 | | | | | | | | |

HORIZONTALE

- Senforma, travidebla kaj duonsolida substanco.
- Ĉefurbo de Saud-Arabio. ■ Sufikso indikanta unu el la egalaj partoj de tuto.
- Mita lando en Ameriko kie abundas oro kaj juveloj.
- (Inverse kaj sen la lasta vokalo)* Speco de haroj formantaj la felo de ŝafo. ■ *(Inverse)* Tradicia rakonto pri la dioj aŭ praavoj.
- Konsonanto aperanta sur multaj aŭtomobiloj en Romo. ■ Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto. ■ Ronda vokalo. ■ La sola ĉapeligita vokalo.
- (Sen la lasta vokalo)* Kolora likvo por skribi. ■ *(Adverbe)* Produkto de la donita nombro per alia nombro.
- (Plurale kaj en akuzativo) Familioj de skorpenoformaj fiŝoj.
- (Inverse)* Taluso, ŝirmanta la soldatojn kontraŭ pafaĵojn venantajn al ilia dorso.

VERTIKALE

- A. Anglia urbo, kies meridiano estas akceptita kiel origina meridiano.
B. (*Inverse*) En alia maniero. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Aŭdebla aervibrado.
C. Konservita lakto en lada skatolo.
Ĉ. Daŭro, pluigado. ■ Laŭ romianoj, 50. ■ (*Inverse*) Prepozicio montranta posedon.
D. Dika modluro kun duoncirkla profilo ĉe la bazo de kolono. ■ Lirika poemo, dividita en strofoj, ordinare similaj inter si.
E. Sur hispanaj aŭtomobiloj. ■ (*Inverse kaj adjective*) Maŝinsimila, senpersonigita laboristo.
F. (*Inverse kaj akuzative*) Filo. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Legomo kun specifaodoro kaj gusto, uzata por spicado.
G. (*Inverse*) Pulmo (en kunmetaĵoj).



SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

Krucvorto.

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| D | A | N | C | I | S | T | O |
| O | R | I | E | N | T | O | J |
| N | A | Ĝ | | K | O | K | O |
| I | K | E | T | O | P | I | H |
| T | O | R | O | | I | A | |
| A | | A | N | O | | N | E |
| Ĵ | I | N | G | L | O | | L |
| O | | O | O | | I | N | O |

Rebuso.

Ni serĉis hispanan provincon.
Sur la bildo aperis

- Publika petanta ripeti brilan pecon al aktoro aŭ artisto → **BIS**
- La litero **O**


Do, sur la bildo aperis BIS kaj O.

La serĉata hispana provinco estas:

BISKAJO



Kiam vi konis vian edzon?



DIVENU LA NOMOJN DE LANDOJ, KIES NOMOJ KOMENCIĜAS PER:

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | N | D | A | L | U | Z | I | O |
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 |

1. La lando de l' tango kaj la gaŭĉoj.
2. La mon-unuo de ĉi tiu amerika ŝtato nomiĝas kiel andaluzia urbo.
3. En ĉi tiu lando estas eble vidi la marvirineton.
4. Ĉi tiu ŝtato troviĝas en la Ibera Duoninsulo, kune kun Hispanio kaj Portugalio.
5. Vi tute certe serĉos vortaron por skribi ĝuste la nomon de ĉi tiu malgranda eŭropa ŝtato.
6. Ne, ne temas pri Pakistano, kvankam la nomo povas ŝajni simila.
7. Ĉu oni pensis en la biografio de Zamenhof kiam ĉi tiu lando ricevis sian nomon?
8. Fajro kaj glacio videblas en ĉi tiu mirinda lando.
9. Nu, reale nur ekzistas unu ŝtato kies nomo komenciĝas per O.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Alejandro Burgos Escalante
José M^a Rodríguez Hernández
Carlos Spinola
Juan Díaz Casado
Alejandro Pinos Cabello
Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



83a Hispana Esperanto-Kongreso



Soria 1a - 4a majo 2025

**Toda la información sobre el
83° Congreso Español de Esperanto
la encontrarás en:**

**Vi trovos kompletajn informojn
pri la 83-a Hispana Kongreso de
Esperanto en:**

<https://kongreso.esperanto.es/es/>